

ESPERANTO

TRIUMFONTO

FINNLANDA
FOIRO
EN
HELSINKI
ĈIUJARE
1-6. DE JULIO

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsvio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonio)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Postĉekkonto Köln 70865, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanoni.

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpigo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage per ET-abonantoj.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 100 Kr.	Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Litova 20 Cd	Rumana 3 Leoj
Belga 0.60 Fr.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lit.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Brita 3/4 Pc.	Francja 0.50 Fr.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levoj	Germana 1.50 Mk.	Jugosl. 1.00 Din.	Pol. 200 Mk.	Svisa 0.20 Fr.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demandu la prezon de sia Abonejo. — Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto — Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svlsan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 100 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

N-o 121 :: Antwerpen Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 28. I. 23.

Konferenco de la Aŭstrujaj Esperantistaj Grupdelegitoj.

(Wien, 6.—7. de januaro 1923.)

Post okjara, pro la apartiĝemo de la aŭstraj Esperantistoj laŭ fakaj kaj partiaj vidpunktoj, disigita agado poresperanta, la aŭstra samideanaro sukcesis, sur neŭtrala, komuna kaj nepolitika bazo fondi la tutlandan parlamentan Esperanto-tribunon de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro.

La prepara kunsido, la 6. jan. antaŭtagmeze, havis lokon en la kunveno de la Esp. Societo Danubio. Kunvenis reprezentantoj kaj anstataŭantoj el Graz (2), Innsbruck, Kierling, Krems, Leoben, Linz, Markt a. Tr., Saalfelden, Salzburg (2), Villach, Vordernberg, Wr. Neustadt kaj 19 delegitoj de la Vienaj usuligoj Esperantistaj kaj multaj gastoj.

La ĉefkunveno okazis posttagmeze en la ĉambro de la Aŭstra Societo de Inĝenieroj kaj Arkitektoj. Post salutaj vortoj de la prezidanto el la prepara komitato, s-ano O. Zimmermann, estis elektita kiel kunvenestro s-ano L. Siedl.

Salutajn skribojn sendis: Urbestro de Wien, Direkcio de la Viena Foiro, D-ro Dietherle en la nomo de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, Ĉeĥoslovaka Esperantista Asocio en Praha, Th. Cart-Paris en la nomo de la Lingva Komitato, Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtistoj, Loka Kongresa Komitato por la XV-a en Nürnberg kaj multaj Esp. grupoj el la aŭstra respubliko.

La diskutoj, okazintaj nur en Esperanto, rezultis unuaniman starigon de la regularo kaj de la laborplano de ĉi tiu reprezentantaro. A. E.-D. konservas la plenan memstarecon de la grupoj en ĉi reprezentataj kaj netuŝitaj en iliaj fakaj aŭ partiaj celoj. Tridekdu Esp. grupoj de la aŭstra landarligo delegas nuntempe al la Aŭstruja Esperanto-Delegitaro laŭ la nombro de siaj anaroj po unu ĝis kvin reprezentantojn.

La elekto por la direktantaro de la A. E.-D. rezultis: Prezidantoj Direktoro Jos. Schamaneĥ, s-ano Karl Bartel-Graz, Profesoro Otto Simon; Ĝeneralsekretario s-ano J. Schade-Wien; anoj de la prezidantaro estas s-ano R. Grössinger-Salzburg, s-ano A. Halbedl-Graz, s-ano E. Herndl, Prof. D-ro H. Jochl-Wien, s-ano R. v. Liedl-Leoben, Provinzialo P. Franz Meštan-Wien, s-ano Franz

Watzinger-Villach. — Krom tio, ankaŭ la landanoj, elektitaj de ĉiuj aŭstraj ligandoj, estas membroj de la A. E.-D.-prezidantaro. — La Centra

Agrabla amuza vespero, kie brilis precipe la kantistaro de la Esp. Laborista Soc. Fratco kaj kie s-ano Weingast bonege deklamis „La Vojo“ —



Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

Fotoj: A. Reiss, Wien, IV.

1. Prezidanto: Dir. Jos. Schamaneĥ; 2. Ĉefsekretario: Prof. F. J. Schade; 3. R. v. Liedl-Leoben; 4. Provinzialo P. Franz Meštan; 5. Grupesro R. Grössinger-Salzburg; 6. Landestro O. Zimmermann-Wien; 7. Grupesro E. Herndl-Wien-Kierling; 8. Kancelero Fr. Zwach-Wien; 9. Nova Tempo-sekretario E. Schade.

Oficejo de la A. E.-D. havas lokon en Wien, VI, Mollardgasse 55.

Efika germanlingva propaganda parolado de Prof. O. Simon pri la temo: „Kio estas Esperanto?“ trovis grandan apiaŭdon de 300 aŭskultantoj, kiuj decidis transdoni rezolucion al ŝtataj oficejoj, korporacioj kaj

kaj monologon el „Hamleto“, finis la unuan konferencaron.

La dua tago montris la saman unuaniman kunlaboron de ĉiuj partoprenantoj. Gravaĵo estas la decidoj, sendi delegitojn al la komerca konferenco en Venezia (Pasko 1923) kaj grandare partopreni la XV-an Universalan Esperanto-Kongreson en

Nürnberg (aŭgusto 1923), al kiu jam aliĝis preskaŭ 200 aŭstroj. Oni intencas aranĝi specialan vagonaron al Nürnberg, kie kunvoki apartan aŭstrujan konferencaron, per lumbildparolado kiel la naturbelecojn de la aŭstra landarligo kaj atentigi pri la graveco de Vieno, kiu estos proponata kiel ejo por la XVI-a Universal Esperanto-Kongreso 1924.

En la aliaj ĉambroj de la Aŭstra Soc. de Inĝ. kaj Ark. dum ambaŭ konferencitagoj estis aranĝita Esperanta ekspozicio, bone organizita de la sekretario de la Eldona Societo Nova Tempo: Emil Schade. Seninterrompe alvenis artoj de sci-emoj, kiuj trovis plenvolan ateston pri la graveco kaj utileco de lingvo internacia Esperanto.

Koncentrigo.

Kvankam riskante tedi niajn legantojn per la ofta ripetado de tiu temo, ni ne volas malaperigi en paperkorbon sekvanan meditan artikolon de s-ano Boubou nek tiun de „Nova Tempo“; ĉar ĝuste la temo „Koncentrigo“ nuntempe estas gravega. Ĝin starigis la demando, ĉu la Esperantistoj daŭre forjetu sian malfacile perlaboritan monon por ĉiuj gazetetoj kaj organizajtoj nenecesaj, malfaciligante per tio la ekzistadon de la necesaj, aŭ ĉu ili subtenu tiom pli forte nur la malmultajn necesajn gazetojn kaj organizojn, per tio ebligante al ili sekuran ekzistadon kaj plejble efikan agadon, por la bono de nia movado, por la rapidigo de nia finvenko? Tiun demandon decidis la Esperantistaro mem per sia estonta sinseado; espereble ĝi decidigos por la pli fruktodona dua ebleco.

Gazetara Koncentrigo.

Koncentrigo de l' Esperanto-gazetaro proponita de gazetoj „Esperanto Triumfonta“ kaj „Nova Tempo“ estas al ni trudata de la postmilitaj ekonomiaj cirkonstancoj: gazetoj, nervoj de propagando, tre malfacile povas vivi. Esperanta gazetaro tre suferas pro tiu malbono. Sed enestas ĉiam ioma bonaĵo en ĉia malbono. La nuna malfacileco devigas la Esperantistojn korekti sian ĝisnunan propagando-metodon, bazitan sur multeco de la organoj (grupoj kaj gazetoj) kaj sur diseco de la penoj, kaj alpreni pli racian metodon, kiu evitigu ĉiam senutilan klopodon kaj trafigu ĉiam nepran efikon.

La nova principo de l' Esperanta movado kuŝas en la vorto: Faktismo. En la nova postmilita epoko, post du-trijara preparado, Esperanto sin

en malvastaj kabanoj; Japanojn, kiuj pro eta disputo disiranĉas sian ventron; Eskimojn ignorantaĵn la rempon, en kiu ili vivas; Negrojn, kiuj ne estas nigraj, kaj kvakerojn, kiuj portas glavon. Oni renkontas ĉi tie morojn, kutimojn, karakterojn... de popoloj plej malproksimaj; hemlisto, adoranto de fajro, kurioza idolano, aĉetisto de statuoj; Arabo nomada piedbatanta ĉiutage la remparojn, dum Hotentoto kaj Indiano maldiligentaj restas en butikoj, stratoj kaj kafejoj. Ĉi tie loĝas almozonema Perso, kiu donas vivimedon al malriĉuloj, kaj sur la sama etaĝo, procentigisto antropofaga. Fine, brahmano, fakiroj, en la pena ĉiufaga ekzerco, ne estas maloftaj, same kiel Groenlandanoj, kiuj havas nek templojn nek altarojn. Tio, kion oni rakontas pri la antikva kaj voluptema Babilono, realigas ĉiujespero en templo dediĉita al harmonio.

Oni diras, ke necesas spiri aeron de Parizo por perfektigi ian ajn talenton. Efektive, kiuj neniam vizitis la ĉefurbon, malofte sukcesis bonege en sia arto. La aero Pariza, se mi ne eraras, certe estas aero apartespeca. Ĝi daŭras sub tango miksigas en tiom eta spaco! Parizo povas esti konsiderata kiel vasta fandejo, kie la viandoj, fruktoj, oleoj, vinoj, pipro, cinamo, sukero, kafeo, la produktoj plej malproksimdevaj — ĉiam kunmiksigas; kaj la stomakoj estas fornoj, kiuj dispartigas tiujn kunmetajojn. P.ej subtila parto devas elvaporigi kaj enkorpiĝi en aeron, kiun oni enspiras: kio fumo! kiaj flamoj! kioma forto da vaporoj kaj elspiraĵoj! El tio, eble, naskiĝas la viva kaj malpeza sento, per kiu distingigas la Parizano, la petolemo, la floro de aprilo, kiu nur al li apartenas.

Ĉi tie senfina nombro da artoj, da metoj, da laboroj, da okupoj diversaj prezentigas al li de l' infanaĝo. Ĉiuj sentoj estas okupataj en ĉiu mo-

Homo.

Skizo de J. Poruks.

Mi komencis observi lin de ĉiuj flankoj. Li ŝajnis al mi kompatinda, sed mi emis ridi je li. Li volis edziĝi...

Subite aperis en li la konvinko, ke estas necese por li edziĝi. Do okazis tiel. Sed viro ne povas edziĝi ne havante kunulinojn. Li iris tian serĉi. Sed lin serĉis neniu. Li estis solulo... do li serĉis kunulinojn, sed ne scilis ĉu preni tiun aŭ alian. Unuvorte: al li mankis „la ĝusta“ amo.

Tion pripensinte li unue ekiris por serĉi la amon. Sed neniu povis doni ĝin al li, ĉar neniu havas multon de tiu ĉi bona kvalito. Fine li sciigis, ke trans la trinaŭj maroj loĝas maljuna sorĉistino, kiu vendas „la ĝustan“ amon. Oni devas nur bone pagi... La homo enŝipigis kaj feliĉe atingis la sorĉistinojn.

„Mi volas aĉeti amon!“ la homo krlis jam de malproksime.

La sorĉistino eniris la ĝardenon kaj baldaŭ revenis kun ruĝeta floro en la mano.

„Ĝi estas la amo!“ la sorĉistino diris montrante al la floro.

„Kiom ĝi kostas?“ la homo demandis.

„Cent rublojn!“ la sorĉistino ekridigis.

„Tio estas multekosta!“ Sed mi pagos, se ĝi estas „la ĝusta“ amo!

„Jen! „La ĝusta“ amo estas blanka, kaj ĝi estas malfacile kulturebla floro! Ĝi kostas tricent rublojn!“

La homo gratelis sin post la oreto. Tricent rublojn!...

Sed li pagis tricent rublojn, kaj la sorĉistino fiksas pingle la blankan floreton sur lia brusto.

En la koro de l' homo vekigis amo. Li veturis returne al sia patrolando por elekti fianĉinon...

Reveninte en la patrolandon li fariĝis tute alia homo. La ĝusta amo brulis en lia brusto. Renkontinte almozulon, li ĉiufoje emnangis al tiu groŝon. Li helpis al malsanuloj, suferantoj. Ĉie survoje lin haltigis orfoj, mizeruloj kaj senfortuloj. Iom post iom li mem fariĝis almozulino kaj la junulinoj ridis lin. Sed ankoraŭ konstante en lia brusto brulis „la ĝusta“ amo...

Fine li estis nepra almozulino. Ĉifonoj kaj difektajoj pendis sur lia korpo. Li devis pasigi la nokton en almozula dormejo. En tia stato li decidis vendi sian plej karan havaĵon, la amon. Li starigis sur strato. Riĉa sinjoro venis al li renkonte. La homo etendis sian manojn, kvazaŭ petante.

„Kial vi almozpetas! Almozpeti estas malpermesite!“ la sinjoro severe ekkriis al li.

„Sinjoro, mi ja ne almozpetas, mi volas vendi mian amon! Sinjoro, aĉetu mian amon!“

„La sinjoro ekridis kaj balancetis la kapon.

„Tiu homo senprudentiĝis!“ li diris kaj foriris.

Kaj neniu deziris aĉeti „la ĝustan“ amon. Sed en la brusto de l' almozulino plubrulis la koro en ĝusta amo.

Fine li ekpensis iri al komercisto de malnovaj aĵoj. La malnovajisto jam krlis de malproksime: „Al almozuloj mi donas eĉ ne groŝon! Iru for! Al la diablo!“

Sed la homo ne lasis sin forpeli. Li volis almenaŭ eldiri tion, kio premis lian korojn.

„Ĉu vi ne volas aĉeti malnovan „ĝustan“ amon?“

„Montru!“ la malnovajisto ekkriis. La homo forigis de la brusto la vestĉifonojn. Sur la flikita ĉemizoj oni povis vidi la velkintan, peletan

amfloron. La malnovajisto estis spertulo, sed li ankaŭ sciis, kiel danĝere estas por li la floro de amo...

„Unu duonrublon mi donos!“ la malnovajisto diris, „sed eĉ ne groŝon pli multe!“

Al la homo estis malfacile disigi de la ama floro; kvankam ĝi estis velkinta. Sed dum du tagoj li nenion manĝis...

Kaj per tremanta mano li donis la sekiĝintan floron al la malnovajisto, kiu ĝin timeme enŝlosis en rustiĝinta fera kesto.

La homo ricevis duonrublon kaj iris manĝi. Nun li ree ekpensis, ke estas necese edziĝi. Sed kiel edziĝi sen amo? Li ne scilis ĉu preni tiun aŭ alian.

Krom tio la homo jam estis tro maljuna. La barbo kaj haroj jam komencis grizigi...

Li vagas kiel solulo kaj faras kompatindan impreson. Sed ĉiufoje, kiam mi lin ekvidas, mi emas ridi.

El la lasta lingvo tradukis K. Strazde.

El „Tableau de Paris“.

Ĉi tiu verko de Mercier, kiu vivis en la dua duono de l' 18-a jarcento, estas fama pro la trafa kaj sprita priskribo de l' tiu-epoka Parizo. En multaj punktoj tiu priskribo ŝajnas rilatanta al la nuna Parizo: sub novaj nomoj postivas antikvaĵoj. Ĉi tie la leganto trovas tradukitan parton de la unua ĉapitro.

En Parizo, homo kapabla pripensi, ne bezonas eliri ekster ĝian ĉirkaŭmuron, por konatiĝi kun homoj el aliaj klimatoj. Li povas atingi plenan scion pri la homaro, studante individuojn, kiuj formikumas en ĉi tiu grandega ĉefurbo. Oni trovas ĉi tie Azianojn, kiuj kuŝas la tutan tagon sur montetoj el pavimeroj, kaj Lapojn, kiuj vegetas

ekaplikas al praktiko. La disfakigo de la movado ebligas utiligon de ĉiu peneto. Esperantisto fariĝas tradukisto, interpretisto de ĉiulingva penso. Per pli-malpli diplomate silenta laboro, li sin trudas al la neŭtraluloj, penetras en ilian agadkampon, tradukas gravajn dokumentojn en iliaj propraj gazetoj, peras iliajn internaciajn rilatojn, kaj devigas la skeptikulojn deklari de si mem la utilon, eĉ neceson de Esperanto.

Ĉu tiu principo de fakismo, kies necesigo estas ĝoliga fakto de nia movado, povas esti severe aplikata en la nuna malfacila stato? Bedaŭrinde, ne tute! Ni estas ankoraŭ en transira periodo, kaj ĝis kiam la fakismo ne estos la regula laboro-metodo de Esperanto, estos utila la ĝenerala propagando, kiu ŝirmos la lingvon kontraŭ ĉiaj atakoj, kaj ebligos la efikan laboron de la Esperanto-fakistoj. Sed en ĝenerala propagando ni devas uzi postmilita novan metodon. Mankas al Esperanto monrimedoj. Tudas la Esperantistojn la senaloga antaŭmilita propagando per multanaraj grupoj, el kiuj ofte eĉ ne unu ano utiligas praktike la lingvon destinitan al praktiko, — per naci-gazetoj, en kiuj oni ripetis la samajn argumentojn. Milito ŝanĝis la kutimojn. Manko de mono, universala vivkosteco fine devigis la Esperantistojn pripensi, ke ili devas ŝpari siajn fortojn kaj ilin elspezi nur por certa sukceso. La solva formulo estas: **Internacia koncentriĝo por ĝenerala propagando.**

Mi starigas la demandon: **Por kio utilas la naciaj Esperanto-gazetoj?** Ĉar kutime ili estas redaktataj parte en Esperanto, ĉu ili utilas por propagando de Esperanto ĉe la Esperantistoj aŭ ĉu por liveri al la allandaj ĝesamideanoj informojn de tri semajnoj legitajn en „Esperanto Triumfonta“? Ĉu presitaj milekzemplere, ili povas propagandi Esperanton en publiko movata de la granda nacia gazetaro? Ĉu ili liveras al siaj legantoj propagandajn materialojn represotajn en naciaj revuoj aŭ gazetoj, kies redakcioj postulas ĉiam artikolojn skribitajn sur nur unu flanko de la papero? Ĉu ili kapablas daŭrigi la fervoron per prezento de naciaj — aŭ ĉu ili utilas, se ili represas interesan fremdlandan artikolon aŭ kronikon eliritan el „Esperanto“ aŭ „Esperanto Triumfonta“?

Nacia propagando estos pli trafa per organizo de „**propaganda Esperanto-servo**“ liveranta komunikadojn al nacia gazetaro, eldonanta multiloje propagandajn flugfoliojn kaj taŭgajn broŝurojn. Lastan jaron en Francio ne plu estis haveblaj la bonegaj propagandiloj: „Tout l'Esperanto sur une feuille“ (Tuta Esperanto sur unu folio) kaj „la brochure rouge“ (Ruĝa broŝuro), dum estis lukse eldonata la gazeto „Franca Esperantisto“ havanta nur kelkajn centojn da abonantoj. La dekmilekzemplere franclingve presitaj broŝuroj pri la „Genève-a konferenco“ kaj pri la „Raporto de Ligo de Nacioj“ multe pli utilas al la propagando ol la du naciaj Esperanto-gazetoj nun aperantaj en Francio. Nur internacieco kaj internaciaj organoj povas elformi verajn Esperantistojn. Esperanto estas Internaciaĵo, ĝi ne plene disvolviĝas sur nacia grundo. Prezentu al lernanto nacia Esperanto-gazeton kaj internacian. Li tuj sin turnos al la dua pli alloga. Per ĝi li pene studos la lingvon, li ĝojos legi ĝin el eksterlando. Li internacie ekvivos per Esperanto. Tia estas la nura celo de nia movado.

La naciemo de l' antaŭmilita propagando-metodo ebligis la bedaŭrindegan malfortigon de multaj Esperantistoj dum milito. Anstataŭ resti kvaŭzaj superframasona frataro, samideanoj sin turnis kontraŭ samideanoj kaj agis tute neesperantiste uzante Esperanton efektive kontraŭ Esperanto. Pri tio ni ne volas pli multe skribi; ni penegas sufokigi nian doloron aŭ kolerkrion. Ni pripensinte nur eliru instruon el la okazajoj de la flepoko. Sufiĉe

mento: oni rompas, failas, poluras, modeligas; metaloj estas turmentataj kaj alprenas ĉiuspecajn formojn. Nelacigebla martelo, fandelo ĉiam ardanta, mordanta fajlilo ĉiam aganta — plaitgas, fandas, disrompas materiojn, ilin kombinas, miksas...

Ĉu la spirito povas resti senmova kaj malvarma, dum ĝi estas stimolata, vekata el la letargio per la krio de l' arto, kiu modifas la naturon? Ĉie la scienco vin vokas kaj al vi diras: rigardu! La fajro, akvo, aero — laboras en ejoj de forĝistoj, tantistoj, panfaristoj; la karbo, sulfuro, salpebro aliĝas ĉe la objektoj iliajn nomojn kaj formojn; kaj ĉiuj tiaj diversaj elaboraĵoj, momentaj verkoj de l' homa inteligentio, igas rezoni la kapojn plej sensaĝaj.

La profesoroj de ĉiuj sciencoj atendas vin sur la katedroj; de tiu, kiu sekcas homan korpon en Kirurgia Akademio, ĝis tiu, kiu analizas versojn de Virgilio en la Reĝa Universitato. Eble vi ŝatas morojn? La teatroj havigas ĉiujn scenojn de l' vivo homa. Eble vi emas mirindajojn de l' harmonio? Kiam mankas la Opero, la sonoriloj vekas muzikemajn orelojn. Se vi estas pentristo, multekolora vestaro de popoloj kaj la diverseco de vizaĝoj... stimulas vian penikon. Se vi estas modemulo, admiru la delikatan manon de modistino, kiu serioze ornamas la pupon, kiu portas la lastan modon en malproksiman Nordon kaj Usonon. Kiam vi ŝatas komercan spekuladon, vizitu juveliston, kiu vendas dum unu mateno kvindek mil skudojn da diamantoj, dum lia najbaro, spicvendisto, ĉiutage vendas cent skudojn da ĉiuspecaj bagateloj por 3 aŭ 4 soldoj.

Baptantaro, kiu renkontas enterigan procesion; la sama pastro, kiu prenis konfesion ĉe agonianto, estas vokata edzigi geflanĉojn. Kaleŝo vin haltigas sur la pavimo, dum almozulo ĉifonekovrita

multaj propagandistoj forlasis promilite nian aferon. Ili estis nur duonesperantistoj de la nacia propagando. Ĉar temas ankoraŭ pri ĝenerala propagando, ni vivantigu ĝin per alprenado de l' Esperanto-principo: justa internaciemo. La nuna formulo de la movado fariĝu: Internacia propagando per internacia koncentriĝo.

Jam la ĝenerala movado koncentriĝas ĉirkaŭ tri bonegaj internaciaj organoj: Esperanto Triumfonta, Esperanto kaj Sennacieca Revuo. Escepte

la necesaj kaj plezurege legataj gazetoj el Ameriko kaj Ekstrem-oriento, malaperu la naciaj Esperanto-gazetoj. Pli longiĝu la fadenoj, kiuj ligis la duon-esperantistojn nur al nacia centro, densiĝu la Internacia reto, kaj baldaŭ la Esperantistaro posedos tri internaciajn organojn, kies nura ekzisto estos propagando, kaj kiuj estos konsiderataj de la publiko ne kiel propagando-gazetoj sed jam kiel gravaj internaciaj informiloj.

Ankaŭ la fakaj gazetoj profitos el tiu ĝenerala koncentriĝo de la propagandaj organoj. Oni ĉiam argumentas, ke Esperanto estas nepraĵo naskita de la nova ekonomio internacia. Ĉu ĝi estas ankaŭ „praktika afero“, ĝi praktikke penetru la mondo-laboron kaj enfakiĝu! Sed en la nuna stato de

l' Esperanto-gazetaro, ĉu povas nia lingvo enfakiĝi, kiam estas tiel multaj naci-gazetoj, mal-ebligantaj vivon de la cetera. Ekzistas por ĵuuloj bonega gazeto „Esperantista Junularo“ organo de U. E. A. J. zorgeme eldonata de samideano-instruistoj en Francio (Robin en Baugé, Maine & Loire). Tamen „British Esperantist“ ĉiumonate publikigas apartan folion kun titolo: „Juna Studento“. Mi tute ne celas kritikon sed reorganizon. Mi scias, ke la eldono de naciaj Esperanto-gazetoj ĉiam elmontras ian fervoron; sed la demando estas, ĉu tiaj iniciataĵoj akordiĝas kun la ĝenerala movado propaganda kaj faka. Ŝajnas, plejofte la kulpo pri tio estas nesufiĉa kono pri la Esperanto-gazetaro. Devas niaj ĉefaj organoj diskonigi precize la fakajn celojn de la kelkaj internaciaj praktik-gazetoj kaj por ili propagandi. Internacia koncentriĝo liberigos katenitajn fortojn: mono, tempo, prizorgemo. Ni pripensu, ke niaj rimedoj tute ne estas senlimaj. Ĝis lasta jaro nia propagando sin montris ideo, sed ne fakta. La publiko restis skeptika. Koncentriĝo ebligas precize praktikan laboron.

etendas la manon al la orumita luksveturilo, en kiu post la vitroj — sidas graso la ŝajne blinda kaj surda. Lin minacas apopleksio, kaj post dek tagoj oni lin, kiu postilasos du aŭ tri milionojn, metos en la teron...

Kiom da elokventaj scenoj, kiuj je ĉiu angulo frapas la okulon, kaj kia galerio de bildoj, plenaj je kontrastoj por iu, kiu scias vidi kaj aŭdi! El la franca lingvo tradukita P. Stojan.

Pereo ĉiela.

De Heinrich Heine.

Alvenis Majo kun la oraj lumoj,
Kun silka spiro kaj aromodoroj,
Logante ĝaje per koloraj floroj,
Kaj salutante per violokuloj,
Sternante la tapiŝon floriĉan
Teksitane el sunbril' kaj frua roso, —
Vokante al si karajn la homidojn; —
Obeas ili la unuan vokon:
La viroj venas en somera vesto;
Virinoj vestas sin per blankaj roboj;
Krispigas la junuloj la lipharojn,
Ondigas la fraŭlinoj siajn brustojn;
Poetoj urbaj zorge enpoŝigas
Paperojn kaj kraĵojn, kaj kantante
La tuta aro iras ekster urbon,
Por sin kuŝigi sur la herbetaro,
Admiri la kreskadon de la arboj,
Ludeti per la mikskoloraj floroj,
Aŭskulti la kantadon de la birdoj,
Jubili al la blua firmamento.
Eĉ min vizitis Majo; ĝi ektrapis
Trifoje mian pardonon: „Jen la Majo!
Revulo pala, venu, mi vin kisas!“ —
Mi ne malfermis kaj senĝoje krlis:
Vi logas vane min, malbona gesto;

Koncentriĝo estas vojo kondukanta Esperanton de utopio al realaĵo kaj al sukceso. *Marcel Boubou.*

Koncentriĝo de la Kulturgazetoj.

La propono de la gazeto „Novaj Tempoj“ (S-ano Vittecoq, Sassetot par Bacqueville, Seine Inf., Francio), kiu vigle propagandas novan popoledukadon ĉe l' Esperantistoj kaj Esperanton ĉe l' edukistoj, rapide progresas. Preskaŭ ĉiuj alvokitaj gazetoj respondis favore al la ĝenerala ideo pri koncentriĝo de la kulturaj Esperantogazetoj ĉirkaŭ unu sola pli dika kun pli multa abonantaro.

El ĉiuj ĉiitaj revuoj, kelkaj ne plu aperas aŭ nur kvaronjare kaj plej necesaj kaj vigla estas „Novaj Tempoj“.

Ĝi ne naskiĝis el la gazet-fonda febro, sed ĝia nepra aperigo estis al ni trudita de la faktaj okazintaĵoj en edukista mondo: Interesiĝo de „Edukista Internacio“ pri internacia lingvo kaj jama utiliga uzado de Esperanto por interrilatigi ĉiulandajn edukistojn ekster ĉia lingva propagando.

La samideanoj, kiuj atente sekvis la kontroverson aperintan en Edukista Internacio pri ties oficiale lingvo, la sisteman atakon

kontraŭ Esp. de kelketo da kontraŭuloj, tute konscias pri la grava rolo plenumita de nia gazeto, kiun neniu Esperanto-gazeto povis ilam anstataŭi sur la koncerna fakgrundo.

Heliĝis la situacio. En kongreso de edukista Internacio dokumentaro de Novaj Tempoj pri verkado de historilibreto modela internacia estis bazo por diskutado. La kongreso de francaj antaŭenemaj geinstruistoj „rekomendis la lernadon kaj praktikadon de la plej disvastigata internacilingvo, t. e. Esperanto“. Tiel finiĝis la kontroverso. La rezultaton ni dankas al N. T., kiu kunigis la penojn de francaj, italiaj, germanaj, finnaj, ĉeĥoslovakaj kaj bulgaraj anoj de Edukista Internacio.

Publiko tute ne Esperantista sin interesis pri nia gazeto, ekternis Esperanton, povis legi gravan dokumentaron kaj tiel ekkonsciis pri neceseco de organo internacia redaktata en unu nura lingvo. Iam skeptika kolego, kiaj estis multaj el ni, nepetite deklaris ke, konstatinte nian praktikan agadon, li pli kaj pli klinas al Esper-

Esperanta ekzameno kaj bankedo en Timiŝoara (Rumanujo).

En Timiŝoara (Rumanujo) 17. dec. okazis Esp. ekzameno kaj bankedo kun originala Esp. teatraĵo prezentado. La ekzamenon ĉeestis grandnombra publiko, ĵurnalistoj kaj reprezentantoj oficiala de la instrua ĉefdirekto s-o Burain, lernejestro. Post la rumanlingva salut-parolo de la Steg-inspektoro s-o Mihaelo Simu, s-o Burain dankis la saluton en rumana kaj hungara linvo promesante siaparte instigi la instruajn korporaciojn kaj profesorojn lerni Esperanton. Poste s-oj D-ro Josefo Nemeth kaj Alfredo Bambach, prezidantoj, informis en hungara kaj germana lingvo la publikon pri la celoj de Esperanto. La ekzamenon,



„Ludinoj de la Esperanta teatraĵo „En maskobalo“: f-ino Rozalio Wagner, s-oj Klas I, Klas II, Capo.

kiun partoprenis 50 gekursanoj, finis la bela Esperanta parolado de s-o Hügel, al kiu s-o Weitzen danke respondis en la nomo de la gekursanoj. S-o Rinaldo Montresor surprizis la Esperantistaron per grandega pentraĵo montranta ĉiujn naciajn flagojn ĉirkaŭ la portreto de nia Majstro kaj pli grandan Esp. standardon.

Post la ekzameno okazis en la sceneja salono de la restoracio „Pumer“ prezento de originala Esp. teatraĵo „En maskobalo“ verkita de nia samideano Baghy el Budapeŝto. Post forteplanduado kaj kantoj oni ankoraŭfoje ludis sukcese la unuaktan propagandan teatraĵon „La renkonto“, verkitan de f-ino Marie Hankel, kie distingis sin per bonega ludo f-inoj Mark, Wagner, gefratuj Tyroler, s-oj Klas I, Capo. Sekvis gaja dancado, kiu daŭris ĝis malfruj noktaj horoj.

anto, kvankam neniam la Esperantistoj provis influ lin pri la supereco de sia lingvo.

Nia deziro estas, ke „Novaj Tempoj“ fariĝu la komuna organo pri universala popoledukado, efektiva pacifismo kaj etiko tutmonda per kuniĝo de ĉiuj homaridealaj fortoj. Ĝi restos progresema sed nesektema. Ĝi laboros por efektiviĝo de „Novaj-Tempoj“-idealoj. Komprenibile la komuna gazeto rezervus apartajn paĝojn por temoj speciale studataj de la nun aperantaj kultur-gazetoj. De nun ni estas pretaj akcepti ĉiujn viajn artikolojn pri klerigo, pacifismo, edukado, eĉ informojn pri fakorganizoj Esperantista.

La propono pri koncentriĝo de progresemaj kultur-gazetoj Esperantlingvaj fakiĝis unu el plej gravaj demandoj de la nuna movado. Oni ne supozu, ke ni kredas je la nepra sukceso de tuta koncentriĝo! Ni proponis nur studon de la demando. En la kaoso de Esperanto-kultur-gazeto, pri kies idealo ni sciis tre malmulte, ni deziris klaran vidon. Fakgazeto devas precize konigi sian fakan celon. „Novaj Tempoj“ tiel agis. Ni faris nian proponon, ĉar ni volas efike labori. En ĝi ne estas ia persona intereso. Se estus necese, por eldoni nuran pli ampleksan gazeton, ni eĉ rezignus la titolon de nia revuo. Ni akceptas ĉies kunlaboron eĉ kiam ideoj esprim-itaj ne tute fratas al niaj, sed ni volas esprimi ĉion, kion ni opinias kaj volas.

Ni povas de nun certigi, ke la ideo pri koncentriĝo de Esperantofortoj ekmarŝas. La Esperanto-gazetoj alvokitaj nun serĉas sian vojon, kaj sin direktos laŭ idealsimpatio. Kelkaj sin deklaris tute pretaj al kuniĝo, kaj precizigis tiel al nia frata idealo, ke por ili kaj ni granda bedaŭrindaĵo estus la diseco de la penoj. Aliaj ankoraŭ ne respondis. Rezultato estos bonaĵo por ĉiuj.

„Novaj Tempoj“.

Komerca Konferenco en Venezia.

1.—4. aprilo 1922.

Provizora tagordo:

1. Spertoj pri Esperanto en Komercio.
2. Spertoj pri Esperanto en Foiroj.
3. Spertoj pri Esperanto en Turismo.
4. Rimedoj por efektiviĝi la rezolucion n-o 2 de la Pariza Komerca Cambio (9. februaro 1921) rekomendanta disvastigi la uzadon de Esperanto por plifaciligi komercajn rilatojn.
5. Internacia Komerca Adresaro per UEA.
6. Helplingvo por Senfadena Telefonio.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Francujo.

En Marseille dank' al la vigla klopodado de la grupo la Mediteranea Esperantista Federacio konsistas nun el dek-unu grupoj; la nove aliĝintaj grupoj estas el Céret (Pyrénées Orientales), Alais (Gard), Vaison (Vaucluse). Ĝia sidejo estas: Esperanto-Helmo, 45, cours Joseph Thierry, Marseille. Prezidanto: s-o Beck, ĝenerala sekretariino: Rokzano. — F-ino Rokzano malfermis superan kurson, por prepari kandidatojn por la atesto pri kapableco. La ekzameno okazos je Pasko.

En Beauvais la komerca ĉambro donis subvenciojn al la loka grupo. En Draveil (Seine et Oise) fondiĝis grupo en ĝardenurbo Paris.

En Paris 14. dec. okazis en la nova ejo de la Pariza gr. speciala lernejo de publikaj laboroj, 3, rue Thénard, parolado de d-ro Privat. — La 20. dec. okazis en „La verdo kato“ sukcesa spektaklo („La timo de la batoj“, komedio de Courteline kaj „La rubeno“ de Lavedan), kiun ĉeestis gesinjoroj Privat. — Esp. budo en la

Mi bone konas vin kaj same bone
La tutan mondon; mi tro multe vidis
Kaj tro profunde; pasis mia ĝojo,
Dolor' eterna premas mian koron;
Mi vidas tra la ŝtonmalmola ŝelo
De domoj kaj de koroj de l' teranoj,
Kaj tie vidas trompon kaj mensogon.
En la vizaĝoj legas mi la pensojn
Malbonajn; sub ruĝiĝo virgulina
Kaŝata pekdeziro ekstremitas;
Entuziasman kapon de junulo
La arlekna ĉapo tinte kovras;
Karikaturojn nur, mizerajn ombrojn
Mi vidas sur la tero, ne sciante,
Ĉu ĝi malsanajn nutras aŭ frenezajn.
Ĝisfunde vidas mi ĉi tiun teron,
Kvazaŭ kristalon, vidas la teruron,
Kiun per verdo gaja kaŝkovradi
La Majo vane penas. La moriintojn
Mi vidas sube en mallarĝaj ĉerkoj
Kun manoj preĝopretaj, fiksokuloloj, —
Kaj tra la lipoj rampas flavaĵ vermoj.
Jen eĉ la filo kun la amatino
Eksidas pro plezuro sur la tombo
De l' paro; moke kantas naŝtingaloj,
La dolĉaj floroj de l' herbej' rikanas, —
La paro ekmoviĝas en la ĉerko,
Kaj pro dolor' ekstremitas tero, la patrino.

Plorinda tero, viajn konas mi dolorojn,
En via brusto fosi vidas mi la ardon.
Sangantaj vidas mi mil viajn vejnojn
Kaj fendiganta larĝe vian vundon:
Elŝprucas sible flamoj, fumo, sango. —

Mi vidas viajn filojn — grandegulojn —
Rampantaj el mallumaj profundegoj,
Svingantaj per la mano ruĝajn torĉojn; —
Kaj almeintje feran ŝtupetaron
Al firmamento iii supren kuras; —

Pigmeoj nigraj sekvas ilin, — krake
Disfalas supre ĉiuj oraj steloj.
Malpie ili ŝiras for la oran
Kurtenon de la Dia tendo, — ĝeme
Vizagen falas pial la anĝeloj. —
Jen sidas sur la tron' la pala Dio,
Dejetas de la kap' la kronon, ŝiras
La harojn, dum la bando proksimiĝas.
La grandeguloj jetas ruĝajn torĉojn
En la ĉielon, la pigmeoj batas
Per fajraj vipoj dorsen la anĝelojn;
Kaj pro doloro ili sin kurbigas,
For oni jetas ilin je la haroj. —
Kaj mian propran vidas mi anĝelon
Kun liaj blondaj bukloj, dolĉaj trajtoj,
Kun am' eterna ĉirkaŭ lia buŝo
Kaj kun felico en la bluokulo.
Koboldo nigra, naŭze malbelega,
Ŝirlevas palan mian anĝeleton,
Rikane okulumas liajn membrojn
Tre noblajn, ĉirkaŭprenas lin volupte —
Kaj tranĉe sonas kri' tra l' universo,
Rompiĝas la kolonoj, — ter', ĉielo
Disfalas, kaj pratempa nokto regas.

Protestkrio de rifuzito.

Tre estimata sinjoro redaktoro!

Tute vi estas abomena homo! Kial vi ne aperigis mian beletan rakonton? — En ET kelkfoje vi petegis la legantojn kunlabori per feliĉonajoj. Mi tuj sidigis kaj skribis rakonton el mia vivo juneca, tiel bele, ke mi mem entuziasmiĝis. Kaj nun mi devas sciigi, ke mia produktajo penplena ne estas akceptita. Kaj mia tuta laboro, kiel ankaŭ entuziasmo estis vanaĵ. — Ĉu vi scias, kiom da tempoj, penoj kaj elspezoj kaŭzis al mi tiu ĉi rakonto? Certe ne. Tion mi volas diri al vi.

Ekspozicio de Aeronautiko en la Granda Palaco. — Kelkaj samideanoj okupiĝantaj pri telegrafio kaj telefonio senfadena intencas fondi grupon por faciligi interrilatojn por Esp. Skribu al s-o A. André, 15, rue Bellefont, Paris 9e.

En Bordeaux kurso en "Athénée Municipal" sub la patronado de Franca Stenografica federacio; kurso en la ejo de la Asocio de la lernintoj de Supera Komercia Lernejo; kurso de s-o Guillot por la laborista asocio de instruado "La Prolétarienne".

En Villeneuve St-Georges kurso por la membroj de la socialista grupo.

En Cette kurso en la unuĝo de katolika junularo.

En Clermont-Ferrand tri kursoj.

En Perpignan 15. dec. okazis Zamenhof-vespero. Post koncerta parto oni trinkis la tradician "Punch". Sekvis dancado. La festo okazis en la ejo de "L'Union Espagnole" (societo, kiu malfermis Esp. kursojn). La gazetaro favore raportis.

Respondo de s-o Bérard, Ministro de Publika Instruado de Francujo

estis presita en "Le Temps" (6. jan.) al la pretesto de la Centra Komitato de la franca ligo de homaj rajtoj. La ministro rekonas "la alian celon" de la Esp. movado kaj diras, ke "la plej konvinkitaj Esperantistoj apartenas al ĉiuj partioj", sed parolas poste pri "malamikceco al la franca lingvo, kiu montriĝis en internaciaj Esp. kongresoj" kaj "ordonas prudentian observadon".

Germanujo.

En Köln sabato, 13. jan., la telegrafa supera sekretario s-o E. Hind el Euskirchen, Del. de UEA, faris propagand-paroladon pri Esperanto okaze de la monata kunveno de la superaj oflistoj de la germana poŝta kaj telegrafa administrado.

Ĥinujo.

En Peking s-o Eroŝenko (blindulo-poeto) bone konata Esperantisto en la malproksima oriento jam duan jaron daŭris esti profesoro de Esperanto en la loka Nacia Universitato.

En Kanton du kursoj de Esp.: en la Registara Normala Kolegio kaj en la Meza Lernejo. Ambaŭ kursojn gvidas s-o M. P. Cecegov.

En Shanghai bone funkcias du kursoj: unua ĉe la Sankta Esperanta Asocio (1780 North Szechuen Road) kaj dua en la Franca Urbo. Gvidantoj estas ĉinaj samideanoj. Multe klopodas pri la kursoj japana Esperantisto s-o Kavakami.

Aŭstrujo.

En Linz la Aŭstra Laborista Ligo (ALL) starigis propran Esp. Oficejon por pli efike disvastigi Esp. inter la proletario. Ankaŭ la policistoj-anoj de tiu ligo klopodas starigi Esp. informojn en la stacidomo por travojaĝantaj korespondantoj. La ligo petas kunhelpon kaj subtenon per Esperantistoj, kiujn bonvolu sendi al Esperanto-Oficejo, Linz a/Donau, Landstrasse 36-1-3, Aŭstrujo.

Esperanto en London.

Je sugesto de la Dimanĉa Rondo la Eitka Societo aranĝis, ke la temo por la diskutita vespero 19. dec. estu "Esperanto en la moderna vivo". S-o Butler faris la paroladon, kiun sekvis libera diskutado. La ne-Esperantistaj ĉeestantoj estis ĝenerale simpatiaj, farante nenian kontraŭstaron. Krom en la gazetoj de la Eitka Societo la kunveno estis anoncata en la "Daily Herald", grava laborista ĉiutaga ĵurnalo. — Ĉe la Dimanĉa Rondo okazis dimanĉe 17. dec. tre interesa kaj vigla debato inter s-oj Read kaj Lane pri la temo "Ke oni ne naskiĝas egalmensaj". S-o Read, la porulo, ricevis la subtenon de granda plimulto, dum s-o Lane kontraŭstarante laŭ nov-psikologia vidpunkto, sin trovis en malkonkorda ĉirkaŭaĵo.

Aŭskultu! — Tago kaj nokte mi sidis ĉe mia skribotablo (kiu ankaŭ estas mia manĝotablo) kaj meditis. Dum la meditado mi ofte estis devigita, forviŝi la fruntsvitgutojn, ĉar la skribado allingve ne apartenas al miaj kutimoj.

Dum la meditado mi ankaŭ maĉis je la plumingo kaj formangis ĝin ĝis la duono. Krom tio — kian aspekton havis mia vortaro Esperanta post la finigo de la rakonto, tion povus diri al vi la bindisto, kiu estis reboniginta ĝin.

Sed tamen — mi estis produktinta tion por nia gazeto, nia ŝatata, sed — koncerne felletonaĵojn — malriĉa ET. Kaj nun mia rakonto troviĝas laŭ publikita listo inter aliaj, same ne aperontaj artikoloj.

Kial oni ellogas la cerbajn loĝantojn pacemajn, se oni ne volas aŭ povas zorgi por ili? Aŭ, ĉu vi opinias, ke mi gajnis mian carbon en la loterio? Aŭ, devus esti mia skribaĵo "aĉo"? Eble, ke la stilo aŭ gramatiko ne estas tute korektaj? Kion faras tio? Mi skribas tiel bone, kiel mi povas. Mi ja ne ankoraŭ estas perfekta Esperantisto (same kiel aliaj). Sed tio ne estas mia propra kulpo. Estas la kulpo de alia. Certe! Aŭskultu! Kiam mi estis fine komprenanta la novan tempon, mi ankaŭ volis profiti lomen el ĝiaj produktadoj. Mi tial aranĝis mian carbon kaj eklernis Esperanton. Kvankam tiu ĉi lingvo estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj, mi tamen havis grandajn penojn pri la lernado kaj studado. (Por aliaj aferoj mia kapo ĉiam havis pli facilan koncepton.)

Supersagulo konsilis al mi, meti la lernolibron nokte sub mian kapkusenon, por ke la vortoj ktp. enpenetriĝus mian carbon dum la dormado.

Mi tuj faris tion. — Sed post la tempo mi tute ne sentis iun utilon per tiu ĉi uzado de la lernolibro, ĉar ĉiutage la libro sin trovis

La III-a Rumanlanda Kongreso Esperantista okazos en Timiŝoara antaŭ la XV-a. De tie la rumanaŝamideoj vizitos en karavano la XV-an en Nürnberg.

I. Internacia gazetekspozicio kaj Esperanto.

Dum la I. Intern. gazetekspozicio okazinta 12—19. XII. 1922 en Praha, Esperanto reprezentis sin per ampleksa stando enhavanta 142 gazetojn ĉirkaŭantaj la bildon de D-ro Zamenhof. La per flagoj ornamita stando estis meze lokita kaj samgranda kiel tiuj de la aliaj ŝtatoj.

La 19. dec. vizitis la ekspozicion ĉs. ministro por eksterlandaj aferoj D-ro Beneš, la iniciatinto de la unua poresperanta rezolucio de la Ligo de Nacioj kaj favoranto de Esperantista mondo. Kiam s-o Pitlik, doninte necesajn klarigojn pri la Esp. ekspozitaĵoj, estis transdonanta al li kolekton de gravaj por-Esperantaj dokumentoj, D-ro Beneš diris: "Tion mi konas, ĉi tion ĉion mi havas".

Internacia Biblia Studanta Asocio akceptas Esperanton.

La ĉefoj de la Internacia Biblia Studanta Asocio, kies centra oficejo estas ĉe 124 Columbia Heights, Brooklyn, N. Y., Usono, decidis la 20. dec. akcepti Esperanton kiel la lingvon de la alvenonta "ora epoko" de la homaro. Oni tuj komencis preparojn por publikigi kurson de lecionoj en Esperanto kaj ankaŭ publikigi interesajn pri Esperanto kaj en Esperanto en la ĉiu dusemajne eldonita gazeto, "Golden Age" (Ora Epoko). Sekcio de ĉi tiu gazeto, kiu havas abonataron de pli ol cent mil en sia angla lingva eldono, estos uzata kiel speciala Esperanta sekcio. Samideano J. D. Sayers, kiu dum la pasintaj du jaroj estas membro de la stabo de la famkonata, malnova ĵurnalo "New York Evening Post", estas redaktoro de la nova Esperanta sekcio.

La Internacia Biblia Studanta Asocio havas membraron en ĉiuj partoj de la mondo, la nombro kalkulas ĝis kelkcentoj da miloj. Ili estas ĉiam tre agemaj, tre sinceraj kaj tre fidelaj al siaj idealoj. Ili estos vere valoraj aldonoj al la Esperantistaro. Ili havas centrojn en Londono, W., Elberfeld, Melbourne, Kopenhago, Orebro, Kristiania, Genève, Rieden bei Baden, Svisujo (Alfred Egg, UEA.-del.), 6 Viertero, Helsingfors kaj Jokahamo (Japanujo). Ili eldonas multajn gazetojn en multaj lingvoj, t. a. Esperanto. Ĉiuj el tiuj gazetoj certe subtenos Esperanton kaj konsilas al siaj legantoj subteni la lingvon. Miloj el ili lernos la lingvon. Ili jam komencis la eldonadon de sia literaturo en Esperanto, la unua broŝuro estas "Milionoj, kiuj nun vivas, mortos neniam".

Esperantistoj ĉie, kie ekzistas Internaciaj Bibliaj Studantoj devas interrilati kun ili, sciligante al ili ĉi tiun novaĵon, se ili jam ne estas ricevitaj ĝin, kaj helpi ilin pri la organizo de klasoj kaj per iu ajn ebla maniero. Certe la religia ideo ne malhelpos verajn Esperantistojn antaŭenpuŝi la komunan idealon.

